

REGO

☆ **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU № 5 (30) oktobro 2005



Moskvo, 2005

enhavo:

- 01 “tagoj de internacia lingvo esperanto” en soĉi
01 e-kantoj sur la kajo
02 la 11-a “velura sezono”
05 kiam la animo komfortas...
08 tra siberio
10 rejm povas aliĝi al reu
10 ago-semajno en tiĥvin
11 konkurso pri informiloj
11 lingvopolitikaj aspektoj de la plivastiĝo de eŭropa unio
14 laborplano: informado kaj instruado en lernejoj
15 uk en rusio
16 jubileo de la co kiel temo en la malferma tago
16 uea denove havas pli ol 6000 individuajn membrojn
17 novaj reu-aliĝoj por 2005
17 kotizoj de reu por 2006
18 kunveno en tiĥvin
18 22-a if – jarfine en germana trier
19 kursoj en burundio
20 instruistoj kolektiĝis en germanio
21 eŭropa tago de lingvoj en odeso
21 uea invitas prelegi en la florenca iku-sesio
22 4-a novjara renkontiĝo en germanio
23 somoso per esperanto, esperanto per somoso
23 forpasis avtandil abuladze
24 moderna rusa vortaro
25 libroservaj furoroj en vilno
26 kantoj el rusio sonas en germanio
27 granda verkisto kaj esperantisto forpasis
28 triĉapitra balado pri unu rastilo (m.bronštejn)
32 rusaj fabeloj
01, 12, 22 anekdotoj
k3 aperis la libro “survoje” de klara ilutoviĉ
k3 tra la tuta urbo – perpiede
k4 disko de paŭlo mojajev

En la unua kovrilpaĝo estas kunmetitaj la fotoj, kiuj aperis en la unuaj kovrilpaĝoj de ĉiuj antaŭaj numeroj de REGo.

PARDONPETO

En la antaŭa numero de REGo pro redakcia kulpo ne estis indikita la aŭtoro de “Miaj impresoj pri UK-90” (pp. 3-8). La impresoj apartenas al Mikaelo Povorin (Moskvo). La redakcio petas pardonon de la aŭtoro kaj de la legantoj.

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 5 (30) oktobro 2005

aperadas ekde 2000

redaktas Garik Kokolija
kunredaktas Viktor Aroloviĉ
kunlaboras Maksim Grišin

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatinickoje ŝosse
45 – 105, 125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2006:

*por loĝantoj de Rusio
kaj aliaj landoj de KŜŜ –
180 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий
Владимирович, Пятницкое
шоссе 45 – 105, 125310 Москва
por loĝantoj de aliaj landoj –
18 eŭroj pagendaj al la konto
kklg-r ĉe UEA*

Klara Ilutoviĉ. Survoje. Originalaj poemoj.

Eld. Impeto. Moskvo, 2005. 56 paĝoj. ISBN 5-7161-0147-X

Aperis la libro kun versaĵoj de unu el la plej bona nuntempaj rusiaj poetoj Klara Ilutoviĉ. Ĝi estas la unua ŝia presita libro, antaŭe la versaĵoj de Klara Ilutoviĉ estis publikigitaj en la kolekto "Moskvaro". Baldaŭ la libro aperos en la Libroservoj. Jen estas unu el la versaĵoj el tiu libro:

La forlasita domo

La domo malplenas. Jam ĉiuj loĝintoj
Ekvivis en domo la nova.
Senvitras fenestroj en ŝtonlabirintoj
De l' brika oldulo senpova.
La dom' neloĝata kaj ruinigota.
Ĉifonoj, tabuloj, paperoj.
Ŝtupar' la faleble danĝera kaj kota –
Ne ardu rabistaj esperoj.
Sur lok' de la dom' iam vive sonora
Fariĝos ebena la tero,
Kaj dume ĝi staras kaduke torpora,
Sen voĉoj, sen lum', sen espero.
Apude rubaĵoj korprenas amasas,
Kotgrize humidas la muroj.
La tempo de homoj kaj domoj forpasas –
En kara memor' aŭ sen spuroj.
Sed novaj kaj novaj domegoj plu altas,
Jen placo naskiĝas, jen strato.
La viv' de la urbo ne velkas, ne haltas.
De kie do gutas kompato?..



TRA LA TUTA URBO – PERPIEDE

01-02.10.2005 en Volgograd sukcese pasis neordinara ago. Tiun agon organizis esperantistoj, sed ĝi origine ne estis Esperanta aranĝo. Do, ni sukcese trapaŝis la tutan Volgogradon per piede de sudo ĝis nordo – ĉirkaŭ 80 km sume. Ni konsumis du tagojn por tio. En tiu paŝado partoprenis 11 personoj en maksimumo. 5 el ili estis




esperantistoj. Kaj tiuj esperantistoj dum tuta vojo portis fiere flirtantan Esperantan flagon. Rezulte aperis artikoloj pri la paŝado en lokaj ĵurnaloj "Molodoj" (Junulo) kaj "Veĉernij Volgograd" (Vespera Volgograd). En ambaŭ artikoloj oni menciis esperantistojn kiel la organizantojn. Kaj en unu artikolo oni enmetis nian foton kun la Esperanta flago.

Anatolij Krasnokutskij (Volgograd)

Disko de Paŭlo Moĵajev

Julie 2005 estis produktita de Societo por subteno kaj defendo de ukraina kulturo “Espero” la unua kant-albumo de Paŭlo Moĵajev (Mevo), esperantisto el Krimeo. La albumo havas la nomon “Pluke-Traduke” – tio substrekas, ke preskaŭ ĉiuj kantoj, kiuj konsistigas la albumon, estas tradukitaj. Enestas nur unu tute originala ero (kun originalaj Esperanta teksto kaj muziko). Jen estas detala listo de la kantoj: **1. Dum vintro ŝtormas kaj fridas...; 2. Kanto pri feliĉo; 3. Tridek tri bovinaj; 4. Reveno; 5. Intervidiĝo kun la kolonelo; 6. Lulkanto; 7. Lulkanto por tiuj, kiuj ne scipovas flugi; 8. Francie aŭtunas; 9. Bruna pantalone; 10. Babaj’; 11. Adiaŭ, adiaŭ; 12. Ĉipa bilet’; 13. Sed ĉio tias; 14. Ha, kia cirko!; 15. La inĵo potenciĝas...; 16. Turneo de**



Ĉielarko; 17. S-ro Misterfelo; 18. La kapojn regas paradiz’; 19. Superstelo; 20. Olda pian’; 21. Via milda malĝoj’...; 22. Lulkanto. Jen el kio devenas la kantoj: 1, 2 – el la filmo “Ivan Vasiljeviĉ ŝanĝas la profesion”; 3 – el la filmo “Meri Poppins, ĝis revido!”; 4, 5, 6 – tekstoj kaj muziko de M.Ŝĉerbakov; 7 – teksto kaj muziko de krimea bardo K.Vihljajev; 8 – teksto kaj muziko de krimea bardo P.Grebjenjuk; 9, 10, 11, 12 – tekstoj kaj muziko de A.Ivaŝĉenko kaj G.Vasiljev; 13 – de la rusia rok-bando “Ĉajf”; 14, 15, 16 – el la muzikalo de

A.L.Webber “Evita”; 17 – el la muzikalo de A.L.Webber “La katoj”; 18, 19 – el la muzikalo de A.L.Webber “Jesuo Kristo Superstelo”; 20 – el la filmo “Ni estas el ĵaz-bando”; 21 – teksto de A.Saĥaltujev, muziko de P.Moĵajev; 22 – aŭtoro kanto de P.Moĵajev.

Preskaŭ ĉiuj kantoj estas prezentitaj kun gitara akompano; la 3 lastaj kantoj estas akompanitaj de piano. La disko estas registrita kaj preparita sufiĉe bonkvalite, ĝin akompanas la tekstolibreto. Gitar- kaj pianludas P.Moĵajev. La prezo de la disko por rusianoj – 120 rub + poŝtelspezoj (por opaj aĉetoj ne malpli ol 5 ekz. – 100 rub + poŝtelspezoj). Pri distribuado de la disko okupiĝas Mikaelo Lineckij. Kontakto lin poŝte: p.k. 91, Kievo-201, UA-04201, Ukrainio; aŭ rete <ml@espero.kiev.ua>.

(esperanto-rus-informoj)